
# *Rememoras Díaz-Canel la murdon de Julio Antonio Mella en Meksiko*




Havano, jan 10 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, rememoris ?i-merkredon la 95-an datrevenon de la murdo en Meksiko de la studenta kaj komunista gvidanto Julio Antonio Mella, ago farita de murdistoj de la diktatoro Gerardo Machado. (1925- 1933).

En lia konto sur X, la kuba ?tatestro rememoris la eposan frazon de Mella, kiam li estis morte vundita en tiu ?i tago en 1929 kiam li estis nur 20-jara: "Mi mortas pro la Revolucio!".

La prezidento anka? alportis frazon de la historia gvidanto de la kariba insulo, Fidel Castro, kiu difinis Julio Antonio Mella kiel "la kubanon kiu plej faris en la plej malgranda tempo".

Díaz-Canel emfazis, ke la 10-an de januaro 1976 la cindro de la kuba revoluciema gvidanto estis deponitaj ?e la piedo de la amata Universitato de Havano.

Anka? la prezidanto de la Nacia Asembleo (parlamento), Esteban Lazo, diris en tiu socia reto, ke la kubanoj hodia? oma?as unun el siaj plej indaj filoj, kiu estas paradigmo por novaj generacioj.

Siaflanke, la Sekretario de Organizo de la Komunista Partio de Kubo, Roberto Morales, anka? esprimis en X, ke la junulara gvidanto da?re estas kura?iga, ekzempla, venka kaj nevenkebla flago de la socialisma Revolucio de Kubo.

En lia mallonga ekzisto, Mella elmontris intensan politikan kaj revolucian agadon kiu katapultis lin en la internacian arenon.

La komunista gvidanto defendis la vizion, ke vera socia renaski?o venos kun la renverso de la tuta porimperiisma sistemo superreganta en sia patrujo kaj en Latin-Ameriko.

En sia lando, li fondis la Universitatan Studentan Federacion (FEU) en 1922 kaj la Komunistan Partion de Kubo en 1925.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/344121-rememoras-diaz-canel-la-murdon-de-julio-antonio-mella-en-meksiko

**Radio Habana Cuba**